

The
NORTH AMERICAN
ESPERANTO REVIEW



NORDAMERIKA ESPERANTO-REVUO

Novembro - Decembro • 1956

IV: 6

The North American Esperanto Review

Published bi-monthly by the ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., as its official organ. Subscription free to members. Subscription for non-members: \$1.75 per year. Other rates: Bulk orders of 15 or 30 copies of any issue may be ordered, in advance, by members, for 60c and \$1.00 respectively; gift subscriptions for schools, libraries, eminent persons, etc., and for Esperantists living in countries outside of North America, may be purchased by members for 30c per year. (The *Review* reserves the right to refuse gift subscriptions for persons who should pay the higher rate.)

Addresses: Subscriptions and bulk orders should be sent with payment to the Treasurer. Correspondence regarding circulation, including changes of address, etc., should be sent to the League Secretary. Send literary contributions, news items, announcements, etc. to the Editor: F. R. Carlson, 2116 North 35th St., Seattle 3, Washington.

Deadlines: The *Review* is placed in the mails about the fifteenth of every second month. Material for publication must be in the hands of the Editor no later than the fifteenth of the preceding month, except for last-minute news items, which will be accepted as late as possible.

THE ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., is a non-profit organization to encourage the use of the International Language, Esperanto. *President:* John L. Lewine, 50 Overlook Terrace, New York 33, New York; *Vice-President:* James D. Sayers, RFD 2, Lillie, La.; *Secretary:* Conrad Fisher, RFD 1, Meadville, Pa.; *Treasurer:* Edward W. Pharo, Jr., 220 County Line Rd., Somerton 16, Pennsylvania.

Membership Dues: Regular Members, \$3.; Supporting Member, \$5.; Patron, \$10; Life Member, \$50; Man and wife, each having privileges of Regular Member, but receiving only one copy of publications, etc., \$4.00.

Members are asked to take careful note of the paragraph above entitled "Addresses" and to address all communications accordingly.

Make all checks and money orders payable to "Esperanto League for North America, Inc."

The North American Esperanto Review

(*Nordamerika Esperanto-Revuo*)

Vol. 4, No. 6.

Nov.-Dec., 1956.

The Review not only permits, but invites, reprinting of material from its pages, except where special notice, such as notice of copyright, appears.

La Revuo ne nur permesas, sed invitas, represon, escepte kaze aperas speciala noto limiga pri kopiado.

CONTENTS (English)

The World Beckons	Page 1
Esperanto Vagabonds in Europe	2
Addresses* (See note below)	10
Suggestions to Beginners	11
Complete Grammar and Pronunciation of Esperanto	Inside Back Cover

ENHAVO (Esperanta)

Trans la Lingvaj Barilojn	Paĝo 4
Nia Literaturo	5
Historio de Esperanto en Rose Valley, Saskatchewan	6
Esperanto en Norda Ameriko	7
Vizito de Sankta Nikolo	8
Bonvolu Skribi (Korespondpetoj)	10
Adresoj*(Vidu noton sube)	10
Niaj Mortintoj	11
Nove Trovitaj Leteroj de Zamenhof	15
Por Rimistoj	16

* Persons or groups listed are not necessarily affiliated with the League. We request, therefore, that inquiries concerning the *Review* or the national Esperanto movement be directed to the proper officials of the League, as listed above.

* Ĉar ne ekzistas filia rilato inter lokaj grupoj kaj la landa asocio, ni petas ke oni sendu ĉiujn demandojn kaj komunikaĵojn rilate la tutlandan Esperantan movadon rekte al: Esperanto League for North America, Inc., RFD 1, Meadville, Pennsylvania, Usono.



The NORTH AMERICAN ESPERANTO REVIEW

Vol. 4

Nov.-Dec., 1956

No. 6



BEGINNING IN THIS ISSUE of the *Review*, we present two series of articles about the kind of touring abroad which is possible only to Esperantists — wherein each new country visited presents

An Adventure in Friendship

Armin Doneis (*Esperanto Vagabonds in Europe*) is a member of the Executive Board of the Esperanto League for North America, Inc., and is the League's representative in the *Universala Esperanto-Asocio*. Mr. Doneis, an Esperantist for many years, is reporting in English in order that non-Esperantists, who cannot travel as Esperantists travel, may share vicariously the joys of one who, traveling abroad, finds himself "not among strangers".

Francis and Bonnie Helmuth, of San Diego, are telling their story in Esperanto. Mr. and Mrs. Helmuth began the study of Esperanto in April, 1955. A year and six months later, they started out on a one-year tour of Europe. Mr. Helmuth says that they hope to visit *all* countries of Europe, *using only Esperanto*.

Although anyone who has the necessary money and leisure may travel across the barriers of oceans and national boundaries, only to Esperantists is it possible to travel

Trans la Lingvajn Barilojn (Across the Language Barriers).



Esperanto Vagabonds in Europe

TEN THOUSAND MILES OF SCENIC DELIGHTS over the highways and byways of Western Europe, with innumerable stops to inspect and explore caves, castles and historic sites, ship locks and canals, mountain tops and waterfalls, museums and cathedrals, alpine meadow flowers, quaint narrow streets and wide vistas, narrow mountain passes and vast glacial terrains. All of these experiences were part of a never-to-be-forgotten four-months summer tour of fourteen countries enjoyed in carefree fashion by the five-member Doneis family of Pharr, Texas.

Peggy, Pancho and Peter, aged 14, 17, and 8, joined their parents, Mary and Armin, the day after school dismissal and hurried north from their Rio Grande valley home on the Mexican border to fly from New York's Idlewild Airport by Royal Dutch Airlines to London on June 8th. After a delightful visit in London and Sutton-Coldfield we flew on to Amsterdam, and from Rotterdam we proceeded on our journey southward in a new German Volkswagen automobile (a marvel of engineering and economy) which was just big enough to hold the five of us with our luggage.

In our wanderings our Volkswagen took us into many interesting nooks in Holland, Belgium, France, Germany, where we enjoyed the atmosphere and flavor characteristic of those lands. Then on to Switzerland, Italy, Austria, where our cameras were busy recording wondrous sights in colors in alpine meadows and passes, on snow-capped peaks and the warm shores of the Mediterranean and Adriatic Seas. Rome, Perugia, Florence, Assisi and the Lilliputian mountain-top country of San Marino offered new thrills and adventures, but the maze of canals and bridges in Venice offered endless delights to the eye and color camera. We took about 700 color pictures enroute and about as many more black and white pictures.

From southern Europe we worked our

way northward thru Innsbruck, Munich, Nurnberg and Hamburg to Denmark and Sweden. Armin drove north (on the left side of the road) to Vättern Lake in Central Sweden where he attended a seven-day conference and retreat of 150 Christian Esperantists gathered from 10 nations, meeting in Jönköping for the congress of the International Christian Esperanto League.

Here only the international language was spoken and each understood all. No interpreters, no headphone translations! The contrast between the close intimate fellowship experienced in these meetings and the "remote control fellowship" of the ecumenical meetings in Evanston, Ill., a few years ago was most striking. In Evanston many foreign delegates had only a smattering of English and could deal only with the prosaic chores, like ordering a meal. When it came to fellowship, they could only smile mutely across the language barriers in Evanston. In Jönköping we were able to share intimate convictions and express our feelings of concord and concern and Christian brotherhood, to witness for our Savior and experience edifying, challenging and strengthening fellowship of the spirit. The simple, neutral, expressive common international language made the difference. Esperanto demolished the language barriers for us at Jönköping.

(Continued on opposite page)



An account of the travels and adventures of the Doneis family of Pharr, Texas.

While Armin admired the lakes and forests of Central Sweden and enjoyed a blessed week, Mary and the youngsters participated in a refresher course in Elsinore (Hamlet's home town) in Denmark. There they rubbed elbows with 250 Esperantists from 15 countries and speedily made close friendships with many, brushing up and becoming fluent in the use of Esperanto, so they can more fully enter into conversations with our many foreign friends. Here the Esperantist family from Texas was sought out for special attention and autographs were much in demand.

August 4th was a busy day for Copenhagen as 2200 Esperantists from 44 nations converged from everywhere for the 41st Universal Esperanto Congress. The reunited Doneis family also moved in with bag and baggage, and were kept busy greeting new friends made in Elsinore or Jönköping, or older friends whom we had met earlier in our travels. Everywhere the green star (symbol of Esperanto) was in evidence on coat lapels, on large banners in the streets, in display windows of Esperanto books, and on automobiles, motorcycles, suitcases and rucksacks of delegates arriving from far-off lands. Everywhere folk were busy getting acquainted, asking "El kiu lando vi venas?" (Which land do you hail from?). And the Mexican sombreros worn by the Doneis youngsters served as a ready means of identification, indicating the family from the Mexican border. National costumes abounded and beautiful dress typical of Norway, Jugoslavia, Netherlands, Iceland, Germany and Finland added a touch of color and charm to the meetings. Often without this clue it was difficult to guess the nationality of participants, since everyone spoke

only Esperanto.

The week in "Wonderful Copenhagen" was a busy and memorable one. Armin represented the Esperanto League for North America, and brought greetings in the name of this organization. His days were full of committee meetings and special hearings which often lasted late into the night, during which basic policies of UEA were hammered into shape. So many pleasurable hours were missed because of graver duties and responsibilities in the Komitato. But the rest of the Doneises scattered far and wide, taking part in all special arrangements, discussions, the international ball, the nights in Tivoli Park with its concerts, its acrobats and pantomime, its mystery house, its illuminated fountains and colorful panoply.


Friendships sprang up with Icelanders, Finns, Jugoslavs, Indonesians, Dutchmen and Japanese and others of the 44 lands represented, and many promises to carry on the friendship via correspondence were exchanged. Of all the charming people attending the Congress, one named Yette from Copenhagen struck a sympathetic chord in Pancho's heart, and he hasn't been the same since. She speaks no English and he no Danish, but abundant exchanges in Esperanto revealed the secrets of the heart and rapturous understanding resulted. Needless to say, a lively correspondence now progresses between Copenhagen and Pharr.

Besides amusements, the Congress also occupied itself with serious study of scientific, political, religious and professional nature. Peace and war were much discussed and surprise was often expressed that even in Texas there are Christian Pacifists and

(Continued on page 14)



Trans la Lingvajn Barilojn



Francis kaj Bonnie Helmuth komencis lerni Esperanton en aprilo, lastjare. Ĉisomere, ili forlasis la hejmon por unujara vojaĝo, dum kiu ili esperas viziti ĉiujn landojn de Eŭropo, *uzante nur Esperanton*. Dua epizodo sur paĝo 13.

Nia heroo staras sur pruo de la luksa vaporŝipo kaj rigardas al Francujo.

TRANS LA ATLANTAN OCEANON, la 3an ĝis la 16an de Oktobro, 1956. — Nia ŝipo, la S.S. Alblaserdjik, foriris el New Orleans, La., je la merkreda vespero, kaj mi kaj mia edzino komencis vojaĝon kiu daŭros dum unu jaro, kiam ni vidos multajn landojn en Eŭropo, kaj vizitos multajn geesperantistojn en diversaj landoj. Dum tiu tempo, ni povos propagandi kaj labori por Esperanto kaj ĝia uzo.


Kiam ni enŝipiĝis ni renkontis la aliajn pasaĝerojn, kaj ili estis amikaj kaj afablaj. Estis anglaj edzo kaj edzino, deksepjara knabo el la urbo Meksiko, maljuna angla fraŭlino, juna amerika fraŭlino, franca dancistino kaj du viroj kiuj estis vojaĝantaj solaj. Mi deziris starigi kurseton dum la dusemajna vojaĝo, sed la pasaĝeroj ne volis studi kaj mi opinias ke ili estis tro mallaboremaj por lerni la lingvon. Almenaŭ ili estis interesataj en Esperanto kaj faris multajn demandojn pri ĝi dum la vojaĝo trans la oceanon. Mi montris Esperantajn librojn al ili kaj ankaŭ turistprospektojn, reklamojn pri Esperanto, la jarlibron, ktp. Tiam mi metis kelkajn Esperantajn librojn en la ŝipan bibliotekon.

Jam ni trovis la lingvan barilon. La dancistino kiu vojaĝis kun ni povis paroli france, itale, hispane, portugale, sed ne en la angla aŭ la nederlanda lingvo. Do estis nur unu persono surŝipe kun kiu ŝi povis interparoli, kaj ni pasaĝeroj neniam konis ŝin. Jen estis afero kiu montris al mi ke

miaj usonaj amikoj eraris kiam ili diris ke oni ne havos malfacilaĵojn kun la lingva barilo kiam oni povas paroli angle. Ankaŭ nia kelnero surŝipa povis paroli angle nur iomete, kaj kiam oni mendis frititajn ovojn por matenmanĝo kelkajn fojojn oni ricevis bolitajn ovojn, kaj la sama afero okazis dum la aliaj manĝoj.

Ni ne trovis esperantistojn surŝipe, sed kiam ni interparolis kun la unua oficiro ni lernis ke li studis Esperanton kiam li estis dekdujara knabo, antaŭ la dua mondmilito, sed poste li forgesis ĝin. Ankaŭ, la kapitano de la Alblaserdjik parolis al ni pri virino, kiu vojaĝis dum la lasta vojaĝo de la ŝipo, kiu estis esperantistino. Li diris ke ŝi estis ĉeestinta la kongreson en Kopenhago dum Aŭgusto. Bedaŭrinde, ni ne povis renkonti ŝin, ĉar ŝi elŝipiĝis antaŭ ni atingis New Orleans.

Dum la vojaĝo trans la belan Atlantan Oceanon mi havis la tempon por pensi pri kelkaj aferoj, kaj dum tiu tempo mi pensis multe pri Esperanto kaj pri la Esperanta movado. Jam mi rimarkis ke kiam oni estas inter eŭropanoj ili almenaŭ scias pri Esperanto kaj kelkaj el ili en la pasintaj jaroj studis aŭ legis pri la internacia lingvo. La afero ne estas sama en Usono, ĉar kiam oni demandas pri Esperanto al usonanoj pli ol duono de ili neniam aŭdis pri ĝi. Se ni iam volas fari sukceson kun Esperanto en Usono, ni unue devas informi la tutan loĝantaron pri ĝia ekzisto.



Nia Literaturo

*Literatura Redaktoro: D. B. Richardson,
3412 North Mullen, Tacoma 7, Washington*

Granda nombro da novaj libroj aperis lastatempe, inter ili kelkaj tre bonaj. Signifa por la movado estas la reeldono, sen ŝanĝo, kaj sub kvazaŭ oficiala aŭspicio, de *Pan Tadeo*, pola ĉefverko de Adam Mickiewicz. La Esperanta traduko (de Antoni Grabowski) aperis jam en 1918, kiam nia lingvo — kaj precipe ĝia literaturo — estis ankoraŭ tre junaj. *Pan Tadeo* — kiu priskribas Pollandon en historia tempo — havas specialan signifon por ni, ĉar ĝi reprezentis turnopunkton en la evoluo de Esperanta poezio. Ĝis Grabowski la literaturistoj, sekvante Zamenhof, uzis simplan, "Fundamentan" lingvon. Sed Grabowski eksperimentis pri neologismoj, nekutimaj vortkunmetoj, speciala adapto de gramatiko, ktp.: unuvorte, li patris tiujn teknikojn, kiuj ebligas niajn hodiaŭajn literaturajn skolojn. Trarigardo de la libro evidentigas multajn tiajn eksperimentojn, el kiuj jen tre kelkaj ekzemploj: *reniras* por "reeniras"; *ĉi* por "ĉi tiu"; *kell-junuloj*, *virgino*, *fermit-okulo*, ktp. Eĉ 'as por "estas" li provis enlingvigi, sed tio sensukcese.

Pan Tadeo estas profunda, serioza libro, tamen ne teda. Ĝi prezentas tre bonan aspekton, estante bele bindita kun pluraj tutaĝaj ilustraĵoj, kaj ĝi kostas nur \$1.50.

La *Stafeto*-serio ĵus pliriĉiĝis je du novaj volumoj, el kiuj unu — *Eseoj* de Gaston

Waringhien — certe havos signifon por ĉiu Esperantisto, kiu interesiĝas pri nia literaturo. Ĝi entenas ampleksajn notojn pri tre diversaj temoj, sed ĉiuj rilataj al la Esperanta belliteraturo. Artikoloj pri la tradukarto donas tre praktikajn konsilojn; komentoj pri kompara literaturo kaj pri humuro estas ege instruaj. Ĝenerale, ĉiu Esperantisto volante kompreni kaj ĝupovi la nunan belliteraturon de nia lingvo devus legi kaj studi ĉi tiun libron, verkitan de kunaŭtoro de *Plena Vortaro* kaj *Plena Gramatiko*.

Alia nova *Stafeto*-libro, *La Infana Raso*, de W. Auld, estas triumfo el literatura vidpunkto sed iom malkvietiga laŭ enhavo. Ĝi ampleksas 25 ĉapitrojn (100 paĝojn) da poezio klopodante prezenti la Vivon kaj la Homaron — certe ne malambicia celo! Laŭ Auld la homo estas nura karno, la spirito ne ekzistas; ni estas sensignifaj terbulaĉoj en malsana, misfarita mondo. La nura espero por ni sidas en tio, ke nia raso troviĝas ankoraŭ en infana aĝo, ke post tempego nieble plibonigos nian sorton.

La verko ŝokas, tiel en sia viv-vidpunkto, kiel ankaŭ en sia nenionkaŝa traktado pri la reproduktaj instinktoj. Ke la libro prezentas materialistan, malreligian filozofion estas konstatebla eĉ antaŭ la legado per pratempa pagana idolo, kiu ornamas ĝian kovrilon.

Kaj tamen! Grandioza la poezio! Oni devas admiri la nuran lertecon de la aŭtoro, kiu pentras siajn etosojn kun aparta lingva genio. *La Infana Raso* ekkaptas sian leganton kaj firmtenas lin ĝis la lasta linio — kion oni ne povas diri pri ĉiu el niaj novaj literaturaĵoj! — kaj la legado tute ne estas malfacila.

Se nur ni havus aŭtoron kun la lingvokapablo de Auld kaj la vivkonceptoj de Pastro Dinwoodie! Nu, feliĉe, ni povas nin turni por reenmondiĝo al alia nova

(*Daŭrigo sur paĝo 12*)



HISTORIO de ESPERANTO en ROSE VALLEY, SASKATCHEWAN

Sinjoro Christie W. Roberts unue interesiĝis pri la internacia lingvo, Esperanto, en la jaro 1924, kiam li aŭdis prelegon pri Esperanto ĉe la kolegio, kie li studis. De tiam ĝis la aŭtuno de 1954, li neniam aŭdis pri Esperanto, kvankam li ankoraŭ estis interesata pri ĝi. Legante la "Saskatchewan Commonwealth", li rimarkis malgrandan artikolon pri Esperanto verkitan de S-ro Hackett de la Centro por Kanadaj Esperantistoj. S-ro Roberts tuj skribis al S-ro Hackett, kaj baldaŭ li posedis la *Edinburgh* vortaron kaj *The Esperanto Teacher*.

Li studis ĉi tiujn librojn dum kelkaj semajnoj sed, ĉar neniu el lia familio interesiĝis, li perdis la propran intereson. Tiam, unu tagon letero alvenis de S-ro Hackett, enhavanta kelkajn demandojn pri la unuaj ekzercoj de la *Teacher*. Ĉi tio revivigis la intereson, kaj S-ro Roberts ree ekstudis. Ĉirkaŭ ĉi tiu tempo li komencis alilandan korespondadon, kaj tiam li tre interesiĝis.

Unu tagon okazis, ke filo de najbaro, kiu estis lernanto en la loka gimnazio, ekvidis la vortaron sur la tablo de S-ro Roberts. Li tuj ekdemandis — kaj certe ricevis bonan informon. Post nelonge en la lernejo estis pritraktata la problemo de lingvoj, kaj la knabo rakontis pri la interesa lingvo Esperanto. Ho, kia stranga afero — tia lingvo! Ankaŭ la instruisto volis ĉion scii. Certe, ankaŭ li ricevis informon. Li havis ideon. Oni ja povus aranĝi kurson.

Li anoncis en la tuta gimnazio, ke okazos Esperanto-kurso, kurso en la "mondlingvo". Anoncis sin 30 kursanoj. Sed kie trovi instruiston? S-ro Roberts mem estis nur lernanto, sed fine li konsentis, kaj la kurso komenciĝis.

Kiel en ĉiuj bonaj aferoj, enmiksiĝis malhelpaĵoj. Multaj gepatroj ne volis ke la infanoj lernu ion, kion ili mem ne scias. Iom post iom malgrandiĝis la aro de la estontaj gesamideanoj. La kurso povis okazi nur vespere. De malproksime ne eblis veni. Ankaŭ la naturo malhelpis. Neĝo falis kaj falis. Jam kvar ĝis ses futojn alta ĝi kuŝis. Nur Neĝmobilo povis alporti la homojn.

Sed la kurso daŭris kaj finiĝis. Restis 8 personoj kaj la gvidanto, S-ro Roberts, kiu mem lernis kun la kursanoj. Kvin el la ok kursanoj nun daŭras vigle korespondi alilanden.

Dume S-ro Roberts lernis pri la Esperanta kurso per poŝto sub la gvidado de S-ro Louis Dormont. Li komencis la kurson kaj finis ĝin dum ĉirkaŭ du monatoj. S-ro Dormont donis (kaj donas) grandan helpon al S-ro Roberts.

Dum la somero de 1956 la Esperanta movado en Rose Valley dormis, krom alilanda korespondado. Sed nun la vintro revenas kaj la neĝo haltigas la somerajn aferojn, la Esperanta movado ekvekiĝas. S-ro Roberts havas novan klason. Ĝi montras bonan intereson de la diversaj grupoj de la vilaĝo. Estas la poŝtestrino, policano, la lernejestro, vendisto, ĉino, grenaĉetisto, domestrinoj kaj mezlernejaj studentoj. Ili estas tre dankemaj pro helpo de diversaj amikoj. S-ro Hackett sendis fonograf-diskon pri la unua leciono de la Connor kurso. S-ro Dormont sendis kelkajn diskonojn pri Esperanto, kaj S-ro Conrad Fisher sendis magnetofonan rubandeton pri la *Esperanto Teacher*. Per ĉi tiuj diskonoj kaj rubandeto la kursanoj aŭdas Esperanton.

Christie W. Roberts

(Redaktora komento: Kaj vi kredas ke vi havas malfacilaĵojn! S-ano Roberts ankaŭ verkas artikolojn por gazeto en najbara vilaĝo, veturas tien por instrui ses plujajn lernantojn.)



ESPERANTO EN NORDA AMERIKO

NEW YORK, N. Y.: *The Esperanto Society of Greater New York*, gastiga klubo por la Kvina Kongreso de ELNA, havas belan novan sidejon: *Esperanto-Domo*, transstrate de la hejmo de UNO. En oktobro, la klubo starigis Lokan Kongresan Komitaton: S-ano Gabor, Sekretario; D-ro Robert Rubenstein, prezidanto de subkomitato pri medicino; ges-anoj Smart, s-anoj Bonesper, Leshner, Shanker, Clarke, Wesser, Dormont, Pease.

La novembran kunsidon alparolis du alilandaj gesamideanoj: S-ano Piron, el Belgujo, kaj S-ano Newell, el Londono. S-ano Dormont raportis pri la Kongreso de ELNA, kaj S-ano Pease raportis pri la Universala Kongreso kaj pri sia vojaĝo tra Eŭropo. La klubo decidis inviti la personaron de UNO al speciala Zamenhofa kunsido, 7 decembro.

Krom nova klaso por komencantoj, starigis konversacia kurso, ĉe kiu oni pagas \$10 komence, sed ĉe la fino de la kurso ricevos la monon, minus \$1 por ĉiu kunsido kiun li ne ĉeestis.

MILWAUKEE, WIS.: Kredeble unuafoje en la historio de la movado, Esperanta klaso aperis per televido! La filmo (ĉe stacio WISN) prezentis mallongan interparolon Esperantan inter J. B. Willarson, Prezidanto de la loka klubo, kaj J. E. Bush, Delegito de UEA. Sekvis vidoj de la Esperanta biblioteko de s-ano Klukowski, kaj klarigon pri Esperanto de Klukowski. Tiam oni montris funkciantan klason ĉe Shorewood Opportunity School, kaj finis per intervjuo inter s-ano Willarson kaj S-ro Davenport, programa direktoro de la stacio.

KION FARAS VIA GRUPO?

SAN DIEGO, CAL.: La klubo ricevis de la Esperanta grupo en Uppsala, Svedujo, sonrubandon de muziko kaj mallongaj paroladoj. La klubo intencas fari respondrubandon por sendi al Uppsala.

SANTA MONICA, CAL.: La 13an de oktobro, la klubo plenigis grandan ĉambron ĉe la Santa Monica YMCA-YWCA per ekspozicio de Esperantaĵoj, okaze de la "International Festival".

LOS ANGELES, CAL.: Komence novan programon de interesaj paroladoj ĉe klubkunsidoj, s-ano Kalmar elektis novembre la tre aktualan temon "Polujo antaŭ kaj post la 2a mondmilito".

WASHINGTON, D. C.: La esperantistaro kreskas! Ges-anoj Docal havas novan filon. Ni gratulas la novuleton, ke li naskiĝis en tia bona Esperanta familio.

Nova klaso komenciĝis, 19 novembro.

SEATTLE, WASH.: La klubo elektis por la venonta jaro: Prez., S-ro Jay Berry; Vicprez., S-ro Duane Walter; Kasisto-Protokolisto, S-ro V. Griffeth; Koresponda Sekretario, S-ino Helen Higbee. Klubkunsidoj ekde decembro okazos je la dua kaj kvara ĵaŭdoj en ĉiu monato, escepte ke Zamenhofa festo, 15 decembro, anstataŭos la kunsidon de 13 decembro.

SPRINGHILL, LA.: Je la 16a de oktobro, J. D. Sayers, Vicprezidanto de ELNA, faris 15-minutan paroladon pri Esperanto per radiostacio KSRB.

LOMPOC, CAL.: Trinkmiksista samideano en Lompoc inventis "Esperanto Cocktail" (Esperanto-koktelo):

3 partoj brando

1 parto *creme de menthe*

Skuu kun glacio. Prezentu en 3-uncaj trunketaj glasoj. Sanu!

Nokton antaŭ Kristnasko
tra tuta la domo
Nenio moviĝis,
nek muso, nek homo.

Ĉe la kamenbreto
la ŝtrumpoj dependis
Kaj Sanktan Nikolon
esperplene atendis.

La infanoj nestumis
en siaj littukoj,
Feliĉe songante
pri kandoj kaj kukoj,

Kaj Panjo kaj mi,
por la nokto vestitaj,
Ĵus ektrankviliĝis,
por dorm' preparitaj,

Ĝis mi aŭdis ekstere
tian bruon eksoni,
Ke mi saltis de l' lito,
la kaŭzon ekkoni.

Tuj al la fenestro
mi kuris rapide,
Eklevis la kadron,
rigardis avide.

La lun', sur la neĝon
falinta vespere,
Prilumis tagece
l' objektojn surtere,

Kaj tie, malgrandaj
kiel marionetoj'
Jen glitveturilo
kaj ok boacetoj.

Ilin viro kondukis
tiel vigla-impone,
Ke li povis nur esti
Sankta Niĉjo persone.

Vizito de S
de Cleme

Tradukis DBR

Pli rapide ol agloj
ili venis kurante,
Kaj li fajfis kaj kriis,
laŭnome vokante:

"Ek! Dasher, ek! Dancer,
ek! Prancer kaj Vixen!
He! Comet, he! Cupid,
he! Donder kaj Blixen!"

Ek al la portiko,
kaj supren la muron!
Nun, ĉiuj ekiru!
Rapidan veturon!"

Kaj, kiel folio
per vento puŝita
Alflugas ĉielon
per salto subita,

Ili flugis tegmenton
laŭ Niĉja parolo:
Boacoj kaj sledo
kaj Sankta Nikolo.

Post nura momento
de supre mi aŭdis:
Hufetoj boacaj
tretadis kaj plaŭdis.

Kanta Nikolo

de Moore



Mi ekturnis la kapon,
de l' fenestro min tiris,
Kiam tra la kameno
Sankta Niĉjo eniris.

De l' piedo ĝis kapo
li pelte vestiĝis,
Kaj pro cindroj kaj fulgo
li tute nigriĝis.

Surdorse li portis
ludilojn en pako,
Kaj similis vendiston
kun lia plensako.

Brilantaj okuloj
gajemon avizis;
La vangoj rozecis,
la nazo ĉerizis,

La buŝo komika
arkiĝis ridete,
Kaj la barb' sur mentono
neĝblankis komplete.

La stumpon de pipo
li tenis perdente,
La fumo ĉirkaŭe
kirligante silente.

La vizaĝ' estis larĝa,
la ventro rondegis,
Kaj skuiĝis gelate
kiam rido lin regis.

Graseta koboldo!
Mi ne povis lin vidi,
Tiel gaja li estis,
sen laŭte ekridi.

Gesteto de l' kapo
sukcesis esprimi
Ke mi havas entute
nenion por timi.

Li eĉ ne parolis,
sed iris laboren,
Plenigis la ŝtrumpojn
kaj turnis sin foren,

Kaj min salutante
per gaja mieno,
Rapide foriris
tra tub' de kameno.

Li ensaltis la sledon,
fajfetis por flugo,
Kaj foriĝis boacoj
kvazaŭ karda lanugo,

Sed ĝis li foriris
li vokis esperon:
"Tre Ĝojan Kristnaskon--
kaj Bonan Vesperon!"



Local Addresses

Please address all inquiries concerning the national movement, requests for addresses not listed here, etc., to:

Esperanto League for North America, Inc.
Route 1, Meadville, Pennsylvania.

Esperanto-Klubo de Los Angeles:
1237 N. Alexandria Ave., Los Angeles 29,

Washington (D.C.) Esperanto Club:
2829 Gainesville St., S.E., Wash. 20, D.C.
Apt. 101

Esperanto-Societo de San Diego:
P.O. Box 4367, San Diego 4, California.

Seattle Esperanto Society:
3231 West 62nd St., Seattle 7, Wash.

George E. Wagner, 403 E. North St.,
Tampa 4, Florida.

H. K. Ver Ploeg, 1908 East 8th Avenue,
Spokane 32, Wash.

Esperanto in Buffalo:
P.O. Box 222, Niagara Sta., Buffalo 1, N.Y.

Esperanto Coterie of Texas:
P.O. Box 805, Houston 1, Texas.

Esperanto Club of Santa Monica:
855 Franklin St., Santa Monica, Calif.

Jarvis E. Bush, 3700 North 75th St.,
Milwaukee 16, Wisconsin.

Esperanto Society of Greater New York:
767 United Nations Plaza, New York 1, NY

Esperanto Society of San Francisco:
346 Staples Ave., San Francisco 12, Calif.

Centro por Kanadaj Esperantistoj:
Box 52, Terminal A, Toronto, Kanado.

Christie W. Roberts, Rose Valley,
Saskatchewan, Kanado.

LISTIGU VIAN GRUPON!

Kristana Bulteno kaj usona sekcio de KELI
Robert Powell, 317 W. 33 St., N.Y. 1, N.Y.

Bonvolu Skribi

La *Revuo* presas senpage (sed eble mal-longigas) korespondpetojn el aliaj landoj. Ili aperas nur se, kaj kiam, konvenas al la redakcio. Por certigi nepran aperon, oni pagu la kutiman anoneprezon (\$1 ĝis 7 linioj). Se resendadreso ne estas legebla, la peto estas nek presebla, nek presinda, do ne presota. SKRIBU KLARE!

Isao Macui, Niŝi 2, Hokurikuso, Ĵohana, Toyama, Japanujo. 27-jara komencanto, deziras korespondi kaj interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kun usonaj kaj kanadaj geesperantistoj.

Evzen Veverka, Miletin 250, u'Horic v Podkrk., Ĉekoslovakio. Interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn, poŝtmarkojn, alumetetiketojn kaj gazetojn. Ankaŭ kun Esperantistoj en Sudameriko, Afriko, Azio kaj Aŭstralio. Respondos certe al ĉiuj.

Tramŝak Viktor, Lemberg 11, p. Podplaz, Slovenio, Jugoslavio. 17-jara studento. Kun geesperantistoj en Usono kaj Kanado.

Eduardo Tamm, Hoimu 28-3, Tallinn IX, Sovjet Estonio, USSR. Kun usonanoj kaj sudamerikanoj.

Kazuhiko Utsumi, 347 Yamamoto-ĉo, Sapporo, Hokkaido, Japanujo. 22-jara komencanto. Kun 16-20-jara fraŭlino.

Baŝtar Miroslav, Stj. Radica ul. br. 31., Virovitica — NRH, Jugoslavio. 30-jara oficisto dez. kor. kaj interŝ. bildkartojn kaj poŝtmarkojn kun ges-anoj en Usono kaj Kanado.

S-ro Suzuki Onoo, 637, Oka, Fuĵiidera, Minamikawaĉi, Osaka, Japanujo. 48-jara instruisto pri ĥemio en duagrada lernejo (agrikultura). Kun iu sam- aŭ pliaĝa.

Peter Anso, Tartu. Kastani 24-1, Estonia S.S.R. Por siaj grupoj, per let. kaj il. p.k. kun ĉiuj landoj. Petas sendi Esperantaĵojn ĉar ĉio perdiĝis dum la milito.



Suggestions to beginners:

ADDRESSES

Your amateur editor-printer has found the answer to one of the major problems of the Esperanto movement. (I carry accident insurance, in case I break my arm patting myself on the back.)

New Esperantists answer ads for foreign correspondence. Their letters are not answered. They are discouraged. We may lose a valuable recruit.

This is sometimes the fault of an irresponsible advertiser, who does not recognize his obligation to answer each letter or card.

But sometimes he *can't* answer. He just doesn't know where to send an answer!

The *Review* prints requests for correspondence free for Esperantists in other countries who want American correspondents. We don't guarantee that the ad will appear. But, so far, we've found space for all *whose addresses we could read*.

New Esperantists are particularly apt to overlook two things:

1. Formation of written characters varies slightly in different countries. A scribble that would be mildly annoying to an American reader might be illegible to one in Germany.

2. A doubtful letter in a familiar word may be easily guessed. In an address, every character must be clear, as the context does not help.

Type your letters, if possible (and keep carbon copies). If you don't type, print addresses clearly and carefully. *Do not try to Esperantize proper names*. A letter addressed to *Murvida Krescento* probably would not be delivered to *Seaview Crescent*.

Let's make it easy for the boys in the Post Office to get the letters to us.

PORTU LA VERDAN STELON

NIAJ MORTINTOJ

Ni bedaŭras anonci, ke ni lastatempe ricevis sciigojn ke mortis ĉi tiuj gesamideanoj:

Sinjorino Mabel G. Smith, pioniro de la Los Angeles-a grupo, en Altadena, Cal.

J. J. Scholtes, en Pittman, Ohio.

Johano Esperanto, en Skelton, Conn.

J. J. Butler, en New York, N. Y.

Legu La Praktikon!

Fino Roan U. Orloff, estraranino de ELNA, legis en *La Praktiko* pri ŝranketo por stencililoj. Ŝi estas oficistino ĉe la Ŝtata Domo, kie ĉiam ekzistis malbona situacio pri mimeografaj stencililoj. Ŝi sciigis sian estron pri la ideo, kaj petis tian ŝranketon.

Oni ne nur aprobis la peton, sed donis al ŝi \$15-an premion pro la sugesto, kaj invitis ŝin en la oficejon de la guberniestro mem, por ke ŝi ricevu la ĉekon el la mano de lia moŝto.

(Kompreneble, ŝi uzis la monon por Esperanto.)

S-ano Roberts petas ke ĉiuj bondezirantoj al la kursanoj en Rose Valley (*vidu p. 6*) sendu poŝtkartojn kun tre simplaj skribaĵoj, por stimuli la intereson. Adreso: Christie W. Roberts, Rose Valley, Saskatchewan, Kanado.

50,000 japanoj lernis Esperanton post la milito, kaj Japana Esperanto-Instituto nun havas proksimume 1800 membrojn.

La Revuo Orienta

Temo de prelego de S-ano František Pytloun ĉe la Esperantista Klubo en Praha, Ĉeĥoslovakio:

“Esperanto kiel nervkuracilo.”

KANTU! RIDU! ĜOJE ANTAŬENI



NIA LITERATURO (*daŭrigo el paĝo 5*)
eldonaĵo: *Gruk*, de dana verkisto Kumbel,
tradukita de Poul Thorsen. Jen frandeblaj
mallongaj poeziaĵoj bonhumoraj, tamen
ne sensignifaj. Ankaŭ ĝi prezentas vivfilo-
zofion:

Gravas la jeno
arte kaj sporte:
Celi kun peno
kaj trafi forte.

Malgranda libro, *Gruk* donas al sia leg-
anto tre plezuran tempeton.

“Marian’s Stamp Service” 2 Sheldon St.
Binghamton, N. Y., dum 8 jaroj eldonis fil-
atelan bultenon sub la nomo “Green Star
Stamp News” (Verda Stelo Poŝtmarkaj
Informoj), tute ne sciante pri Esperanto.
S-ano Fisher skribis al la eldonanto. En la
oktobra (1956) bulteno aperis informoj pri
Esperanto kun aserto ke la eldonanto nun
lernas Esperanton. Kun la decembra nu-
mero dissendiĝis faldfolio pri Esperanto.

ESPERANTO KAJ KULTURO

Internacia Pedagogia Revuo

Not only for teachers of Esperanto, but
also for beginners and experts

- *Provocative Articles
- *Esperanto News Briefs
- *Linguistic Discussions
- *Model Lessons
- *Reviews
- *Profusely Illustrated
- *12 Issues Yearly

Calendar year subscriptions \$1.50
Subscribe through
J. E. Bush, Peranto
Delegito de U. E. A.
3700 North 75th St.
Milwaukee 16, Wis.

PATRONOJ de la KVARA KONGRESO

George E. Wagner	\$5.00
S-ino Erna Sindhvad	5.00
S. A. Klukowski	5.00
Francis E. Helmuth	6.00
V. J. Weigt	3.00
Louis Dormont	5.00
Roan U. Orloff	3.00
Howard G. Borden	3.00
Van and Gary B. Van Hill	3.00
Esperanto-Klubo de Los Angeles	3.00
Jess L. McCowan	3.00
John H. Taylor	3.00
A. Chmielwicz	3.00
John L. Lewine	3.00
Glenn P. Turner	3.00

Kaj *La Revuo* danke kvitanças donacon:
\$10.00 de S-ano Armin Doneis.

ANONCOJ

*Tarifo: \$1 ĝis sep linioj. Dek procenta
rabato por du- aŭ plifojaj aperoj. Petu
informon pri tarifo por pli grandaj aŭ
multfoje aperantaj anoncoj aŭ reklamoj.*

Kristana Esperantista Ligo Internacia
estas interdenominacia asocio de protest-
antaj esperantistoj. Ĝia gazeto *Dia Regno*
aperas monate, eldonate en Nederlando.
Ni invitas ĉiun esperantiston konsideri
abonon al la gazeto, aŭ membrecon en la
ligo. Petu informojn kaj provekzemplerojn
de la usona peranto, Donald R. Broadribb,
310 So. 13th East, Salt Lake City 2, Utah.
Kotizoj (abono: \$1.40, membreco: \$1.60)
estas pageblaj al la peranto aŭ al la libro-
servo.

FACILA SKRIBADO

Fonetika sistemo de Intersteno, facila,
simpla kaj klara, eliminas malfacilaĵojn
de literumado kaj prononcado. Okpaĝa
instrulibro, prezo 10¢ per poŝtmarkoj,
havebla de A. E. Regal, 310 — 4th St.,
Downers Grove, Illinois.



Trans la Lingvajn Barilojn Dua epizodo

Sub la Verda Stelo en Francujo

LE HAVRE, FRANCUJO, 16 OKTOBRO—

La S.S. Alblaserdjik alvenis ĉe la haven-urbo, Le Havre, je la 10a ptm, la 15an de Oktobro, kaj estis tro malfrue por elŝipiĝi, do ni devis atendi ĝis merkreda mateno. Tiun matenon la vetero estis bela, la suno brilis, kaj ne estis malvarme ekstere. Antaŭ la matenmanĝo, je 7:30 atm, viro atendis min en la ripozejo de la pasaĝeroj. Kiam mi proksimiĝis al li, ŝajnis al mi ke mi vidis verdan steleton sur lia jaketo, kaj kiam mi estis staranta apud li, li salutis min per la belaj, bonaj vortoj, "Bonan matenon, sinjoro."


La viro estis Jean Gibaux, membró de la Esperanta grupo en Le Havre. Li diris al mi ke la delegitino tie ricevis mian leteron el New Orleans, Usono, kaj ke li volas konduki min kaj mian edzinon al la domo de Helene Amiard, instruistino. Unue ni matenmanĝis surŝipe, kaj tiam, je la oka kaj duono, ni iris aŭtomobile al la domo de la delegitino.

Helene Amiard estas ĉarma, afabla virino kiu parolas preskaŭ perfekte Esperanton, kaj ŝi diris ke ŝi volas prezenti nin al siaj gesamideanoj en Le Havre, per kunveno tiunokte. Bedaŭrinde, ni devis foriri, ŝipe, je la tria ptm la saman tagon, do ni ne havis la okazon por renkonti la aliajn geesperantistojn tie. Almenaŭ, ni babiladis dum unu horo, Esperante (ŝi ne povis paroli angle), kaj tiam Samideanino Amiard montris al ni diversajn partojn de sia urbo.

Le Havre estas bela urbo kie multaj ŝipoj haltas por ŝarĝi kaj malŝarĝi varojn kaj pasaĝerojn ĉiutage. Ĝi estis parte detruita dum la dua mondmilito kaj oni konstruas multajn belajn konstruaĵojn;

ĉambrarojn kaj konstruaĵojn por komercaj aferoj. La novaj konstruaĵoj estas modernaj kaj belaj, kaj havas tri aŭ kvar etaĝojn super allogaj butikoj. En la plej malnova parto de la urbo estas la malnovaj butikoj kaj magazenoj kaj sur la larĝa trotuaro estas budaroj, kie oni vendas ĉiajn aĵojn. Estas la merkato kie la loĝantoj aĉetas manĝaĵojn, vestaĵojn, juvelojn, bombonojn, ktp.

Ankaŭ la delegitino nin helpis trovi la oficejon de la Amerika Ekspreso kaj la poŝtoŝtationojn, kaj ni sendis poŝtkartojn kaj leterojn al niaj geamikoj en Usono. Je la 12a ni aĉetis Svisan fromaĝon, ŝinkon, vinon kaj panon, kaj portis ilin al la domo de Samideanino Amiard por nia tagmeza manĝo. Post la manĝo ni denove babiladis Esperante, kaj post du bonaj horoj de interesa interparolo ni devis adiaŭi kun la espero ke denove ni vizitos la urbon Le Havre kaj eble renkontos la aliajn geesperantistojn tie.





ESPERANTO VAGABONDS (from page 3)
not just gun-toting cowboys. Many of the sectional meetings dealt with a wide scope of activity.

A special congress for 133 blind persons from 13 nations was in progress in the framework of the 41st, and a Children's Congress where songs, stories and games of an international character and flavor held fascination and joy for the younger generation of Esperantists, aged 6 to 13. They were kept happy in an international community, sleeping, eating, dancing together in Esperanto in a well appointed and managed "kongresejo" especially decorated in harmony with the spirit of the Infana Kongreseto. We saw Peter only briefly three or four times during the week, when he and his international friends took part in some special features of the adult congress arrangements. With him were 30 children from 10 countries. His sombrero was much in evidence and all wanted to wear it. He got a full-length picture, complete with interview, published in the chief newspaper "Politiken" of Copenhagen. In

fact, all members of our family were much photographed, quoted and misquoted in numerous newspapers in Denmark, Sweden, Holland, Italy and other countries during our travels.

When all official business had been concluded, reluctantly baggage was packed and one great sigh of regret went up after the last singing of the Esperanto hymn, "La Espero". The week had been much too short! But all beautiful things have their end. Regretfully we said "Ĝis revido" to our many friends. They insisted, "You must visit our country!" or "Do visit us in Finland!" or "How can you leave Europe without visiting us in Jugoslavia?" or "When will you come through my town? Be sure to let me know! I want so much to have you be my guests!" So ended the 41st in Copenhagen in the embryo "Republic of the World", where the "Latin of Democracy" had again been successfully and exclusively used, and had again demonstrated its ability to survive and serve in the reconciliation and drawing together of all God's children from every nation.

HEROLDO DE ESPERANTO

DUONMONATA INTERNACIA
ORGANO DE LA ESPERANTO-
MOVADO

Prezroj:

Abono tutjara ----- \$4.00
Abono januaro-junio ----- 2.50
Abono subtenanta ----- 8.00
Anonceto po 25 vortoj ----- .50

Nordamerika peranto:

Donald E. Parrish
328 West 46th Street
Los Angeles 37, Calif.

la Praktiko

LA GAZETO DE LA MONDPOPOLO

Monata internacia ilustrita revuo

Prezroj:

Jarabono (nur por kalendara
jaro) kun membreco en Uni-
versala Ligo: \$2.00
Anonceto po 25 vortoj: .50

Nordamerika peranto:

Donald E. Parrish
328 West 46th Street
Los Angeles 37, Calif.



Nove Trovitaj Leteroj de Zamenhof

BULTENO de ASOCIO de ESPERANTISTOJ en POLLANDO publikigis en sia maja numero tri leterojn skribitajn de D-ro Zamenhof al la Loka Kongresa Komitato de la 8a Jubilea Esperanto-Kongreso en Krakovo en la jaro 1912. La *Revuo* represas la plej interesan el la tri. Kursivoj signas substrekojn de la aŭtoro mem. Se vi deziras kompletigi vian "Originalan Verkaron" per kópioj de la leteroj, kredeble la polaj samideanoj volonte plenumos tiajn petojn. Mi konsilas ke oni ĉiam sendu kun tiaj petoj aŭ respondkuponojn, aŭ stelojn de UL, por ke la komplezanto ne devu pagi por la privilegio servi vin. Jen la adreso: *Bulteno de Asocio de Esperantistoj en Pollando*, Warszawa, ul. Kožia 3, Pollando.

Dro. L. L. Zamenhof 14. II. 912
Varsovio, str. Dzika
No. 9

Karaj Sinjoroj!

En la provizora programo de la Krakova kongreso mi legis, ke Vi preparas interalie vesperon speciale por honori *min persone*; tial mi volas nun peti Vin letere pri tio, pri kio mi jam buŝe petis profesoron Bujwid, nome: ke Vi elĵetu el la programo ĉion, kio povas havi ian rilaton al mia *persono*. La kongreso devas esti jubileo nur de Esperanto, ekskluzive nur de *Esperanto*, sed neniom okupi sin pri ĝia aŭtoro. Se estos ia oficiala akcepto, ĝi devas porti la nomon ne "akcepto de Zamenhof", sed akcepto de la esperantistaj *reprezentantoj*"; nenie kaj neniam starigu mian buston, ne preparu por mi ian donacon, ktp.

Mi ne povas letere detale klarigi al Vi la kaŭzon de mia peto. Eble Vi mem ĝin komprenos kaj sentos, se Vi pripensis la diversajn artikolojn, kiuj en la lastaj du jaroj aperis kontraŭ Esperanto en la gazetoj de nia lando. Ankaŭ en aliaj landoj de tempo al tempo aperas artikoloj kontraŭ Esperanto, sed ili kontraŭbatalas nur la *ideon* aŭ la *lingvon*; sed ĉe *ni* tiaj artikoloj estas ordinaraj bazitaj nur sur pli aŭ malpli maskita malamo kontraŭ mia *persono*. Estas vero, ke mi al neniu faris ian malbonon; sed mi estas hebreo kaj naskiĝis en Litovujo.

Mi tute ne volas plendi, kaj mi ne volas paroli ĉi tie pri la esenco de intergenta malamo; mi nur konstatas la fakton, kaj mi atentigas Vin, ke oni devas esti prudentaj kaj ne inciti senbezone multajn homojn per honorado de mia persono.

Se Vi timas, ke ne honorado de mia persono eble malagrabla mirigos la esperantistojn, Vi povas tuj en la komenco de la programo klare publikigi, ke tia estas mia nepra deziro kaj la "conditio sine qua non" por mia veno al la kongreso.

En la okazo, se Vi nepre bezonos paroli pri mia persono, Vi povas min nomi "filo de pola lando" (ĉar neniu povas nei, ke la tero, en kiu kuŝas ambaŭ miaj gepatroj kaj sur kiu mi konstante laboras kaj intencas labori ĝis mia morto, estas mia hejmo, kvankam mi ne estas naciisto), sed ne nomu min "polo" por ke oni ne diru, ke mi — por akcepti honorojn — metis sur min maskon de popolo, al kiu mi ne apartenas.

Ĉar, por eviti ian malĝustan paŝon, Vi eble bezonas scii, al kiu popolo mi *mem* alkalkulas min, mi sciigas Vin, ke laŭ mia politika-religia *konvinko* mi estas nek polo, nek ruso, nek hebreo, sed mi estas partiano de "homaranismo" (ne miksu kun "kosmopolitismo"); laŭ mia *deveno* mi alkalkulas min al la gento *hebrea*.

Via
L. Zamenhof



OR RIMISTOJ

(POETOJ NE LEGU!)

KNABETO

Mi estas malgranda
 Kaj bona knabeto;
 Kun nigraj okuloj,
 Kaj saĝa kapeto.
 Vestita en blanko,
 Kiel vera anĝelo;
 Kun bela vestaĵo,
 Aĉetaĵ' el ĉielo.
 Sed lerni mi volas,
 Nur iom, ne multon.
 Avertas instruisto
 Atingos vi stulton.
 Estu senzorga,
 Mi respondas trankvile,
 Esperanton ellerni
 Estas tute facile.

Ida Saville

ARIO: *Yankee Doodle*
 Ridu, Ridu, Ho, Ho, Ho,
 Plorado estas vana:
 Tutkore ridu, Ho, Ho, Ho,
 Kaj ĉiam restu sana.
 Ha, Ha, Ha, kaj Ho, Ho, Ho,
 Foriru vi, malĝojo!
 Iru kaj ne estu tro
 Haltema sur la vojo!
 Ne ploradu, ne, ne, ne,
 Sed estu vi gajema:
 Por vi la mondo ridos,
 Se vi estos esperema.

S-ino Walton

Ĉu *vi* havas rimon por la *Revuo*?

Novaj Rimistoj

Saluton al du novaj *Rimistoj de la Revuo*. S-ino Walton kaj Ida Saville estas Los Angeles-anoj. Ĉiu el ili nun rajtas nomi iun publikan bibliotekon, lernejon, aŭ alilandan amikon, al kiu ni sendos la *Revuon* senpage dum unu jaro, komence per ĉi tiu numero.

Aliaj, kiuj verkis artikolojn presitajn en la *Revuo* dum la pasinta jaro, gajnis la saman rajton. Ĉiu el ili, kiu ankoraŭ ne nomis ricevonton, bonvolu fari tion nun, se ili deziras uzi tiun rajton. Laŭ mia listo, la jenaj verkintoj havas tiun rajton:

Wm.E.Baff, H.G.Borden, D.E.Parrish, R. H. Clark, Vuk Ekner, Robert W. Han-num, Ivo Lapenna, Julio Baghy, Charles Chomette, Boĥo, R. Eichholz (2), George Falgier, At. D. Atanasov-Ada, Adrian Hughes, Laurence E. Gage, Dr. Lehman Wendell, Conrad Fisher, plus tiuj, kies verkoj aperas en ĉi tiu numero. Ĉu mi ellasis iun?

VERKU POR LA REVUO!

Ree dum la venonta jaro la *Revuo* donos al ĉiu, kies verko aperos en nia gazeto, tiun rajton. Malgranda rekompenco por granda servo! Tamen, ĉu vi ne fierus se *via* verko aperus en bela gazeto sur breto de via loka biblioteko, aŭ se via alilanda amiko vidus vian nomon subskribitan ĉe gazetartikolo, kaj poste ricevus kvin pluajn numerojn memorigajn pri vi?

Ekde nun, al ĉiu adreso en "Lokaj Adresoj" ni sendos tri ekzemplerojn de ĉiu numero en kiu la adreso aperos, por helpi al la loka propagandado.

LISTIGU VIAN GRUPON!

Complete Grammar, Alphabet and Pronunciation of Esperanto

THE ALPHABET

a, b, c, ĉ, d, e, f, g, ĝ, h, ĥ, i, j, ĵ, k, l, m, n, o, p, r, s, ŝ, t, u, ŭ, v, z.

The sounds of the vowels (a, e, i, o, u) are the vowel sounds in: "Are there three or two?" The consonant sounds are as in English, except: *c* as *ts* in hats, *ĉ* as *ch* in church, *g* as in *go*, *ĝ* as *g* in *gem*, *ĥ* as *ch* in loch, *j* as English *y*, *ĵ* as *z* in azure, *s* as in so, *ŝ* as English *sh*, *ŭ* as English *w*.

THE GRAMMAR

1. There is no indefinite article; there is only a definite article (*la*) alike for all sexes, cases and numbers.

2. Substantives end in *o*. To form the plural, *j* is added. There are only two cases: nominative and accusative; the latter is obtained from the nominative by adding *n*. Other cases are expressed by prepositions (genitive *de*, dative *al*, ablative *per*, etc.)

3. The adjective ends in *a*. Case and number as for substantives. The comparative is made by means of the word *pli*, the superlative by *plej*; with the comparative the conjunction *ol* is used.

4. The fundamental numerals (not declined) are: *unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek, cent, mil*. Tens and hundreds are formed by simple junction of the numerals. To mark the ordinal numerals, *a* is added; for the multiple, *obl*; for the fractional, *on*; for the collective, *op*; for the distributive, the preposition *po*. Substantive and adverbial numerals can also be used.

5. Personal pronouns: *mi, vi, li, ŝi, ĝi, si, ni, vi, ili, oni*; possessives are formed by adding *a*. Declension as for substantives.

6. The verb undergoes no change with regard to person or number. Forms of the verb: time *being* (present) takes the termination *-as*; time *been* (past) *-is*; time *about-to-be* (future) *-os*; conditional mood

-us; imperative mood *-u*; infinitive *-i*. Participles (with adjectival or adverbial sense): active present *-ant*; active past *-int*; active future *-ont*; passive present *-at*; passive past *-it*; passive future *-ot*. The passive is rendered by a corresponding form of the verb *esti* (to be) and a passive participle of the required verb; the preposition with the passive is *de*.

7. Adverbs end in *e*; comparison as for adjectives.

8. All prepositions govern the nominative.

9. Every word is pronounced as it is spelled.

10. The accent is always on the next-to-last syllable.

11. Compound words are formed by simple junction of the words (the chief word stands at the end). Grammatical terminations are also regarded as independent words.

12. When another negative word is present, the word *ne* is left out.

13. In order to show *direction toward*, words take the termination of the accusative.

14. Each preposition has a definite and constant meaning; but if the direct sense does not indicate which it should be, we use the preposition *je*, which has no meaning of its own. Instead of *je*, we may use the accusative without a preposition.

15. The so-called foreign words (that is, those which the majority of languages have taken from one source) undergo no change in Esperanto, beyond conforming to its orthography; but with various words from one root, it is better to use unchanged only the fundamental word and to form the rest from this in accordance with the rules of the Esperanto language.

16. The final vowel of the substantive and of the article may sometimes be omitted and replaced by an apostrophe.



WE'RE TAKING
Time Out
TO WISH YOU
A HAPPY
NEW YEAR

